

TEA-BULTENO

23^A JARO - N° 153

JULIO - AÚGUSTO

N. 7-8/2020

Feliĉo estas io mirinda: ju pli vi donas, des pli restas al vi.
Blaise Pascal, franca sciencisto pri filozofio, fiziko kaj matematiko (1623-1662)

Kara Legantaro!

Ŝajnas ke iom post iom estas revenanta la normaleco ankaŭ por ni, kvankam oni ankoraŭ ne rajtas malintensigi atentemon kaj singardemon. La danĝero povas kaŝiĝi eĉ malantaŭ la plej proksima angulo.

Mi esperas, ke vi ĉiuj sukcesis superi ĉi kronvirusan periodon en bona sanstato, samkiel ĉiuj viaj familianoj, geamikoj, esperantistoj ktp.

Adaptiĝante al la cirkonstancaro, nun devige estas daŭrigi la kutiman agadon por nia afero, kaj ĉefe oni devas ree renkontiĝi por kunlabore plani strategiojn kaj alfronti la tiom krizan situacion, ne nur en nia ordinara ĉiutaga vivo, sed ankaŭ en nia Esperantista vivo.

La longdaŭra fermiteco hejma, la manko de rektaj kontaktoj, la haltigo de ĉiaj aktivadoj asociaj/klubaj kaj ceteraj konsekvencaj malfacilaĵoj elprovis nin ĉiujn. Sed feliĉe ekaperis signoj de reago, esperodona kaj precipe engaĝiĝaj. Kiam unu post la alia estis nuligitaj ĉiuj kongresoj/renkontiĝoj/konferencoj, de UK al fakaj, al naciaj, al regionaj ktp, en Esperantujo oni ekpensis, ke la perdo de tiel gravaj eventoj estus katastrofa por nia komunumo

kaj trovis la solvon, organizante ... virtualajn renkontiĝojn. Teknologio helpis, por ke esperantistoj povu finfine mergiĝi en viglan esperantan etoson.

Alvenis rete invitoj partopreni en Monda Festivalo de Esperanto, kiu jam ekis la 20^{an} de junio kaj kiu finiĝos la 20^{an} de septembro ĉj: tiu

inkluzivos VK-on (Virtualan Kongreson),

* ILEI-Konferencon kaj multajn aliajn aranĝojn. Vi mem surpriziĝos leginte la vastan programon de Mondafest' kaj elekto estos malfacila pro la bunteco de la eroj: kiun prelegon aŭskulti, kiun kongreson partopreni, ĉu en Usono aŭ Afriko aŭ Mezoriento aŭ en la plej diversaj landoj Eŭropaj? Ĉu vi deziras sekvi ĉiagradajn E-kursojn, aŭ gaje kun-

kanti aŭ kunbabiladi? Aŭ eĉ klaĉi kaj ĉeesti Kafejan Kunvenon? Ekzistas diverspecaj ebloj: certe vi trovos kion vi plej ŝatas kaj interesas, tial nepre vizitu la sekvan ttt-ejon kaj elektu laŭ viaj preferoj pri temo, dato kaj horaro: <https://eventaservo.org>.

Ne maltrafu ĉi belegan servon kaj ĝuu belan kunestadon kun geamikoj tra la tuta mondo!

Kore, la redaktanto

*** La bunta emblemo de Mondafest'2020 !**

IAMA REVO...



NUNA REALO!

Jam en Triesto

Kiuj jam konatiĝis kun Triesto kaj ties ĉi ĉirkaŭaĵoj, certe vizitis la Kastelon de Duino, rezidejon de princoj von Thurn und Taxis (*itale: della Torre e Tasso*). Jen kelkaj vortoj pri ĝi: ĝin oni starigis jam en la 14^a jc. sur la ruinoj de romia militantaŭaĵo. Ekde la 17^a jarcento ĝi iĝis kultura kaj humanisma centro. La kastelo aŭdis la paŝojn de elstaraj gastoj: Elizabeto kaj Arkiduko Francisko Ferdinando el Aŭstrujo, Grafo de Chambord, Johano Strauss, Gabriele d'Annunzio, Paul Valery, la bohema poeto Rainer Maria Rilke... Ĉi lasta venis ofte al la kastelo, ankaŭ por kontentigi sian plezuron promenadi en silenta kaj sovaĝa naturo, ĉirkaŭanta la princan rezidejon.

Alrigardante la blankajn klifojn de Duino, oni ekvidas naturan terason, unu el la plej sugestoplenaj padoj el la tuta karsto. Paŝante sur krutaj ŝtonoj, la poeto eltiris inspiron por la kreado de versaĵoj de siaj *Duinaj Elegioj*. Fakte tralegante ilin, oni povas retrovi tiun neforviŝeblan spuron pri la magia fascino de ĉi roka bordo, de tiu blanka klifaro sin ĵetanta en la maron.

Sed antaŭ kelkaj tagoj, mi eksciis ion vere eksterordinaran pri tiu fama pado, nomata *Pado Rilke*. "La pado estis kreita de mia avo, Alojs Tomasini, ŝtontajlisto - kun fiero rakontas lia nepino Lidja. Iun tagon, antaŭ la 2^a mondmilito, la avo estis reveninta hejmen kaj ŝi, infanino, atente aŭskultis lin informantan, ke princo Aleksandro donis al li tre gravan taskon, nome el la rokaro ĉizi padan vojon, alkondukanta de la kastelo al *Sistiana*, laŭ la rokokresto. Gigantega la laboro, ĉar la pado estis 2-kilometra! Dum kvin longaj jaroj, la ŝtontajlisto ŝvite laboradis, per la sola forto de siaj manoj, helpe de malmultaj kaj rudimentaj iloj. Sed tiu forto, tiu eksterordinara forto, fizika kaj mensa, bezonatis nepre por malsatigi lian familion. La pado, rezulto de plurjara laboro, estas nuntempe konsiderata unu el la ĉefaj turismaj allogaĵoj en regiono Friulo Julivenecio. Por la duinanoj, la loĝantoj de *Duino*, ĝi estas la vojo de l' Klifoj (alta marborda krutaĵo), konsistanta en vasta rokflanko longa ĉ. 300 metrojn, alta inter 50 kaj 80 m, parte natura, parte postrestaĵo de malnova fronto de ŝtonmino. La tuta teritorio estis tiam tute senkreskaĵa kaj senarba: tie, nur fine de la unua mondmilito, oni ekplantis kelkajn arbojn.

"Kvin jarojn mia avo tie hakadis la ŝtonojn - plurakontas la nepino Lidja per kortuŝita voĉo - kaj, kvankam etulino, mi jam havis tre precizan kaj seriozan taskon: daŭre kaj konstan-

te mi devis turni la karbopecojn, sidantajn en tiel dirita "foghera"* [elp: fogera], por ke mia avo Alojz varmegigu la ĉizilpintojn, per kiuj poste li bategis la rokon".

Por Lidja estis tio fiereckialo, ĉar tiu 'deĵoro' tute ne estis bagatela. "Cetere - ŝi aldonas - tute ne eblis eviti tion ĉi, ĉar la tuta familio, senkonsidere de aĝo, devis kontribui al komuna vivtenado".

Plikompletigas la memorojn de Lidia ŝia ludkunulo, Eljo, kiu aĝas iom pli ol ŝi. Kian rolon li havis en ĉio ĉi? Ion ekstrema nemalhavebla: alporti al Alojz la tagmanĝon! Tiutempe ne ekzistis manĝopaŭzoj, neniam eblis forlasi sen vere urĝa motivo sian laborlokon, seninterrompe oni laboris ĝis ... la ĉielo malheliĝis, tial Eljo - same loĝanta en Duino - startis de sia hejmo kun gamelo entenanta varman *jota-n*** por malsatigi la laboriston. "Rapide mi paŝadis, por ke la manĝo estu konsumita de li ankoraŭ varma - memoras Eljo - kaj tiu eksterordinara homo, por rekompenci min de la longa irado, ĉiutaga, lasis ĉiam sur la fundo de la manĝujo kelkajn kulerojn el tiu supo, kiu por mi estis la plej gustuminda frandaĵo."

Temas pri simpla rakonto pri hieraŭa aŭ - pli bone - antaŭhieraŭa vivtenado de simpluloj, de homoj kiu perlaboris la panon por sia familio kaj por si pene, peze, eĉ koste de propra sano.

Pluregajn fojojn mi promenadis, ire kaj revene, laŭ tiu pado, kiu estas unu el la mirindaĵoj de nia teritorio, sed neniam mi estus imaginta ke tiu vojo estis mane 'skulptita' de nur unu persono, ene de 5-jara periodo, vojo longa du kilometrojn, du kilometrojn banatajn per la ŝvitado de Alojs, sub bruliganta suno aŭ sub vipado de ventoblovoj, somere kun temperaturoj super 30° aŭ vintre, sub la nulo. Kiom da vundoj, kiom da blazojoj***, kiom da kaloj, sur liaj - eble sengantaj - manoj? Kaj kiom da doloroj, ŝultre, dorse, genue, brake, mane!?!?

La finaj konsideroj de liaj tiutempaj kunhelpanoj, nepino Lidja kaj ties ĉi amiko Eljo, certe iom mildigitaj de la tempopaso, de la forgesemo, de la amo al tiu bravegulo, bonfaras al ĉies koro: "Tiam ni vivis en la eta vilaĝo Duino, ombre de la kastelo: preskaŭ nenion ni posedis, sed ni same feliĉis, ĝuante tiun malmulton kiu nur al ni apartenis."

Kunmetita el artikolo de la triesta ĵurnalo *IL PICCOLO*, ED

Noto * Laŭvorte, fajrujo; speco de kaldroneto, en kiu kuŝis la karbopecoj.

** Supo el fazeoloj, terpomoj kaj acida brasiko.

*** Haŭta veziketo el maldika histo, entenanta likvon aŭ aeron.



Denove pri Plasto!

'Nenio nova sub la ĉielo' – jam iuj ekprotestos. Jes, mi tre insistas pri tiu ĉi argumento, ĉar de la solvo pri la tuta problemo de plasta invado en la maro, en la ĉielo, en la bestoj kaj eĉ en la homa korpo mem, dependas la estonteco de nia planedo kaj la vivo de la venontaj generacioj. Tamen, bedaŭrinde, daŭre aperas NOVA problemo pro la senfina kaj ĉiukampa uzado de tiu materialo.

Per artikolo, aperinta en februaro ĉijara, la brita ĵurnalo *The Guardian* analizas la ĉefan problemaron rilatantan nutraĵajn ujojn aŭ envolvajn el plasto kaj demandas: ĉu tiuj estas sekuraj por la sanstato?

Tutunue ĉiu el ni devus kontroli, kiom da tiuj plastujoj troviĝas en kuirejo. Kaj plie, kiom da tiuj, plenaj je plej diversaj manĝaĵoj (legomoj, fruktoj, viando, biskvitoj, pano, plekaĵoj ...) aĉetitaj en superbazaro, oni portas hejmen. Krome, kiom da tempo pasis ekde kiam oni metis ilin en fridujon/ŝrankon ĝis la momento de konsumado: ankaŭ tio ĉi konsiderendas.



Sed ni aŭskultu la opinion de esploristoj. Oni asertas, surbaze de statistikoj, ke malpli ol la 10% de la finproduktita plasto ĝis nun estas reutiligata.

La produktada ĉeno uzas centojn da diversaj kombinaĵoj, kies efektoj sur la homan korpon estas grandparte nekonataj. Aldonindas, ke tiuj donitaĵoj ne ĉiam prezentas trankviligajn informojn. Sekve de tio ĉi, en la artikolo, aparte oni dediĉiĝas al la rilatoj inter plasto kaj nutraĵoj, surbaze de la aktualaj konoj. Do, el tio ja sekvas, ke ankoraŭ multo estas esplora kaj komprenenda.

La unuaj priserĉitaĵoj estas la ujoj por nutraĵoj, enhavantaj la **ftalatojn**. En PIV legeblas, ke temas pri *Salo de ftalata acido*, $C_6H_4(COOH)_2$. Por mi, persono tute nekonanta la ĥemian mondon, tiu klarigo estas tro mistera, tial mi serĉas informojn aliloken. Jen, trovitaj la bezonataj scioj. Je ĉi punkto mi havas ian strangan sensacion, ĉar mi eksentas miajn kapharajn hirtiĝi. Unue oni tuj avertas, ke tiuj ftalatoj jam estas forigitaj, ekzemple, de tiuj materialoj kutime uzataj por produktado de teleraro por infanoj, pro sia danĝera efiko sur la endokrinan kaj reproduktan sistemojn, sed

nesciatis, kiam efektive tiu ĉi malpermeso startis kaj konsekvence nesciatis, kiom da infanoj jam estis ensorbintaj tiun ĥemiaĵon. Tiuj saloj apartenas al familio de ĥemiaj kunmetaĵoj uzataj en la industrio pri plastaĵoj, kiel plastigaj agantoj. Mi haltas tie ĉi: se oni deziras pliprofundigi la temon, estas pluraj ebloj en interreto. Kio tamen timigas min estas la konstato, ke tiuj estas ofte utiligataj ankaŭ kiel solvantoj de parfumoj kaj pesticidoj. Sed ni ekkonsciu, pri kio ankoraŭ ni povus trovi en la nutraĵoj. Oni diras, ke ju pli oni fosas, des pli oni trovas, kaj tiu diraĵo validas ankaŭ en ĉi cirkonstanco.

Alia kategorio estas atakita de esploristoj, nome tiu de **bisfenolo A** (mallonge: Bpa) kaj ties ĉi derivaĵoj – koncize ankaŭ tiu ĉi substanco kaŭzas la samajn damaĝojn, supre diritajn, en la homo – pli detale ĝi agas sur la endokrinan sistemon kaj povas interveni dum la evoluado de la feto, precipe atakante la nervosistemon. Surbaze de la evidentoj de tiaj efektoj, Bpa estis eliminata kaj anstataŭigita per Bps kaj Bpf, kiuj – se kredi al postaj multnombraj studoj – provokas ... la saman problemon de Bpa. Ĉu ne estas la tuto kiel iu koŝmaro de kiu oni ne povas liberiĝi? La informoj trovitaj vere estas ŝokaj, ankaŭ ĉar ne videblas ia konkreta elirvojo. Miaopinio, la ununura problemo konsistas en tio: ne ekzistas vera volo ŝanĝi la situacion, ĉar nur MONO bedaŭrinde regas la tutan mondon; ĉar unuopula vivo valoras neniam; ĉar neniu interesiĝas pri la estonteco de nia planedo kaj ĝiaj loĝantoj – pli gravas la estanteco, kaj fine kiom da homoj reale engaĝiĝas por celi la savon de la tero? Estas en la manoj de kelkaj, miliardoj da personoj, kiuj, eĉ se levantaj laŭte sian voĉon, estas tro facile silentigitaj.

Sed ni revenu al la ftalatoj: kiel dirite, la ftalatoj apartenas al grupo de ĥemiaj substancoj por igi la plaston pli feksebla kaj pli malfacile rompebla. Ili troviĝas en centoj da produktoj, kiel linoleumo, gluaĵoj, lubrikaj oleoj, purigaj elementoj, akvoimunaj teksaĵoj, kaj diversaj aliaĵoj kiaj sapoj, ŝampuoj, ŝpruciloj por hararo kaj unĝolaj. Plie ili enestas en la plastaj folioj por envolvi, aerŝveligeblaj ludiloj, ujoj por konservi sangon k.m.a. Tro multe da objektoj uzendaj kaj uzablaj por la homoj. Evidentas, ke oni devas tre funde elserĉadi por malkovri la konkretajn kaj aŭtentikajn efektojn de tiu ĥemiaĵo sur la homan sanon.

En tiu artikolo de *The Guardian*, oni prezentas krome la dubojn pri la diversaj materialoj, teorie garantiitaj, sed ordinare submetataj kaj elmetataj al pluraj fizikaj kaj/aŭ ĥemiaj agantoj, ekzemple al la varm(eg)o – telerlaviloj kaj mirkoondaj fornoj – aŭ al grasaj nutraĵoj, kiuj altiras la plastajn molekulojn.



➔ Pasintjare germanaj kaj norvegaj serĉistoj testis la efektojn de specimenoj el boteletoj por ŝampuo, jogurtaj vazetoj kaj aliaj komunuzaj ujoj: oni trovis toksajn elementojn por la ĉeloj, el kiuj kelkaj estas ankoraŭ tute nekonataj. Tiu ĉi malklaraĵo certe ne estas kaj ne estos facile solvebla, la tuta afero ne tiel simplas kiel ĝi povus ŝajni. Oni daŭre esploras, serĉados por prezenti malkonfuzajn rezultojn, sed kiam? Kiam ni ĉiuj sufokiĝos en oceanoj da plasto?!? Mi ne ŝatas esti pesimisma, sed tro nigra kaj senfina estas la tunelo, ĉar prikonsiderindas ankaŭ la ekonomia flanko de la pro-

Ĝis la bela sonĝo de l' esperantistaro...


Jam de multaj jaroj, pro mia ŝatata ĉevaleta, mi ekhavis okazon legi pri la fama Esperanta Park-Urbo. Instigis min serĉadi pliajn informojn la akiro de kvar tre signifaj propagandmarkoj, buntaj kaj allogaj. En la reta tre detala historio de la E-movado en Munkeno, Germanio, estas kelkaj donitaĵoj pri la "konstruota Esperanto-Urbo", kiuj legeblas ĉe la ttt-ejo: http://www.esperanto-muenchen.de/Klub/Geschichte/unua_jarcento.html

Sed interesa artikolo pri tiu avangarda projekto aperas en 1912 en la *Pola Esperantisto*, plume de la fama rusa verkisto Vasilij Nikolajevič Devjatnin.

Per unupaĝa teksto li raportas entuziasme pri la iniciato:

La 8an de Junio de tiu ĉi jaro en München estis fondita nova societo, nomita Propaganda Ligo Parkurbo-Esperanto. Tiu ĉi mirindega Societo nun estas okupata per grandioza entrepreno: ĝi elpaŝis al konstruado de... Esperanta urbo! [...] La afero, kiel ĉiuj grandaj aferoj, estas tute simpla: tre riĉa Münchena bankiero S-ro Schler donis al la Propaganda Ligo (nдр: poste P.L.) pli ol unu milionon da kvadrataj metroj da tero, kiuj troviĝas je 13 kilometroj de München, ĉe la bordoj de Vürm-rivero. Kaj laŭ la genia plano de nia fervora s-ro Schlaf [...] oni ekkonstruos la Esperantan urbon.

Tiu ĉi admirinda afero ne estas ia utopio aŭ neefektivebla revo, sed jam fakto, [...] La konata arĥitekturo (Fritz) Sievers preparis jam la detalan planon [vd. tie ĉi]



blemo. Tamen iujn etajn konsilojn mi kuraĝas doni: mi tute ne estas sciencisto, eĉ ne esploristo, nur simplulo kiu klopodas protekti siajn familianojn, amikojn k.a. de la riskoj kiujn alportas la troa konsumado de plasto. Unue, kiam eblas, anstataŭigu plastajn aĵojn per taŭgaj ujoj el metalo aŭ vitro. Due, ne elmetu plastujojn al varmfontoj aŭ ĥemiaj agantoj. Trie, ĉiam kontrolu la limdatojn. Kvare, kaj laste, ne konservu oleon kaj grasajn manĝaĵojn en plasto.

Simplaj konsiloj, sed bonefikaj!



Tradukis kaj komentis ED, el *Il Fatto Alimentare*

de la konstruota urbo (kies multaj kopioj estis disdonitaj al niaj samideanoj dum la Oka), kaj eĉ desegnojn de multaj komunaj konstruaĵoj, kiel ekzemple: teatro, kazino, lernejo, preĝejo, banejo k.t.p. Por la necesaj unuaj elspezoj ĝi havas jam kapitalon da 2.000.000 markoj. [...]

En la vastega kaj bonege aranĝita oficejo de la Parkurbo-Esperanto, laboras ankaŭ kelkaj spertaj oficistoj, inter kiuj estas tri rusoj [...] kiuj ricevas salajron de s-ro Schuler.

En sia detala raporto V. Devjatnin rakontas pri la plana disvolviĝo kaj sekva vendado de la diversaj loĝejoj. Imagu, ke oni antaŭvidis ĉ. 500 konstruaĵojn! Intertempe kvardek placoj jam estis venditaj al kelkaj diversnaciaj esperantistoj. Multaj privataj entreprenistoj proponis siajn servojn por la starigado de la komunaj urbopartoj, nome teatro, kazino, lernejo ktp. Krome, laŭ ilia ideo, ĉiu aparta domo devis esti ĉirkaŭita de arboj por garantii freŝan aeron kaj agrablan malvarmeton dum somero.

Al kiuj antaŭvideble estos venditaj la placoj, la domoj de la estonta urbo? Nur al esperantistoj, aŭ al tiuj familioj, en kiuj almenaŭ unu ano estas esperantisto! Post kiom da tempo tiu urbo, la centro de la tuta Esperanto movado, ĉefurbo de la Esperantujo, en kiu koncentriĝos ĉio kio iamaniere rilatas al Esperanto kaj Esperantismo estos preta? Tio okazos post du aŭ tri jaroj, do ĉ. en 1914-1915. Atenton kaptas la listo de kelkaj eminentuloj kiuj, kiel honoraj membroj de la PL, plene apogas la eksterordinaran projekton: inter tiuj ankaŭ nia Majstro!

Tiel ĉi emfazas ĉi planon V. N. Devjatnin:

[...] post kelka tempo ➔



Parto de unu el tri komercaj distriktoj.

nia verda standardo gaje flirtos en nia propra ubo, en nia ĉefurbo de nia karega Esperantujo! Kaj nun de vi mem dependas ankoraŭ plirapidigi la aferon per viaj aliĝoj al la P.L. Aliĝu do, karaj samideanoj, aliĝu kiel eble plej multnombre, - despli, ke la aliĝo estas tute senpaga: oni ja ne petas de vi ian materialan sed nur moralan subtenon, kiu foje signifas pli multe, ol mono, - kaj **via devo, sankta devo**, estas doni al niaj energiaj samideanoj tiun moralan subtenon. Aliĝu do senprokraste, sendube, kaj ekvoku kune kun ni: vivu Esperanto kaj ĝiaj pacaj batalantoj!

V. N. Devjatnin

La vortoj de tiu famega rusa verkisto kaj tradukisto, tiel entuziasmaj, tiel fervoraj, tiel instigemaj min vere kortuŝis: jen kio animis plej grandan parton de niaj antaŭuloj, kiuj inter la mil kaj unu malfacilaĵoj sukcesis antaŭenirigi nian Aferon ĝis nia tempo!

Antaŭ ol fini ĉi artikolon, mi deziras ke nur iomete vi konatiĝu kun tiu rusa eminentulo. Vasilij Nikolajevič Devjatnin naskiĝis en 1862 kaj mortis, 76-jara, la 28^{an} de marto 1938 en Leningrado. Li iĝis instruisto pri la latina kaj rusa literaturoj. Unue li konatiĝis kun Volapuko kaj poste, en 1891, kun Esperanto. Post unumonata studado li jam pretis por traduki la poemon de Miĥail Lermontov: *Anĝelo*, aperintan en *La Esperantisto*. De tiam li ekkorespondis kun L. Zamenhof, kies amiko iom poste li fariĝis. Li partoprenis en la Unua UK (Bulonjo-sur-maro - 1905) kie oni elektis lin en la Lingva Komitato. En 1911 (UK - Antverpeno) li gajnis sian unuan premion en literatura konkurso. De la belga ĉefurbo, laŭ la invito de Generalo Sebert, li iris Parizon, kie dum unu jaro vigle laboris por nia lingvo. De tie li piediris, kun la turka esperantisto Romano al la Krakova UK (1912): la vojaĝo daŭris 42 tagojn. La rakonto, verve vigla, vere legindas*. Post la kongreso li eklaboris en Munkeno por la entreprenon *Parkurbo-Esperanto*. Fine de julio 1914 li ekveturis al Parizo por la UK, sed nokte la va-



gonaro estis haltigita: ĉiuj al-Parizaj vojaĝantoj estis arestitaj kaj per longaj flankvojoj oni resendis ilin al Leipzig. V. Devjatnin fariĝis militkaptito en la urbeto Traunstein apud Leipzig ĝis 1918. Post la unua jaro en la kaptitejo, li povis dediĉiĝi al sia varbagado, ekinstruante al germanaj suboficiroj, pro kio li ricevis eĉ salajron. Inter 1918 kaj 1922 li laboris en Leningrado, gvidis kursojn, estris societojn ktp; poste li translokiĝis al Kiev. Siajn lastajn tri vivojarojn li pasigis en Leningrado kun sia nevo Jakob. Li estis enterigita en la loka tombejo.

Lia literatura agado estis vere tre ampleksa. De li aperis en *Fundamenta Krestomatio* versaĵoj originalaj kaj tradukitaj kaj la originala rakonto *Arturo*. Li tradukis poemon de Lermontov, verkojn de Puŝkin (*Boris Godunov*, *Poltava* k.a.) kaj multajn aliajn poemojn rusajn kaj alilingvajn. Verkis originalajn komedietojn: *Edziĝo*; *Nefinita dramo*; *La instruita mimikisto*; krome la rakonton en versaĵoj *Nevola mortiginto* kaj *Unuaj Esperanto-Satiroj*. Kolekto de liaj literaturaĵoj aperis en la kvar volumoj de *Plena Verkaro* (1906-11, 584 p.). Kompreneble ankaŭ prilingvajn librojn li skribis: tio estas *Elementa E-a Sintakso*, 1924; *E-a Afiksaro*, 1914; *Lernolibroj* por

rusoj k.a. Li kunlaboris per artikoloj en *La Esperantisto*, *Ondo de Esperanto* kaj pluraj aliaj ĵurnaloj. Kiam aperis la reformemeco de Esperanto, li aŭdigis sian fortan voĉon kontraŭ la lingvoreformoj kaj restis senŝanĝe fidela al la Zamenhofa Esperanto ĝis sia morto.

Sed ni revenu al la Parkurbo-Esperanto. Post tiu elana komenco, kio estis okazinta? Malgraŭ la promesplenaj premioj kaj ... *la subteno de miloj da aktivaj, monposedantaj esperantistoj el la tuta mondo, verŝajne la komenco de la unua mondmilito malhelpis la fluon kaj ricevon de mono el malamikaj landoj* [**], tiel ke fine tiu bela sonĝo degelis kiel neĝo sub brile arda suno!



➔ Tiu defio, kiu sukcesis allogi multegajn esperantistojn vidintajn en tio ne nur ian monalportan oportunon, sed ĉefe la realigon de propraj idealoj, fiaskis fakte pro la eksplodo de la milito kiu kaŭzis la bone konatajn katastrofajn konsekvencojn ne nur Eŭrope sed tutmonde.

Sed tiu revo ne malaperis el ĉies menso kaj koro, nur ĝi ŝanĝiĝis kaj adaptiĝis al la cirkonstancoj. Ni venu al pli proksimaj tempoj, al la 1960^{aj} jaroj, kiam, denove en Germanio, en Herzberg am Harz, tre viglan agadon, tre inteligentan kaj konstruan, komencis Joachim Giessner, dum 46 jaroj prezidanto de la Germana E-Fervoista Asocio kaj dum 22 prezidanto de IFEF. Li sendube preparis pli glatan vojon al sekva, intensa aktivado de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy. Ekde 2006 danke al iliaj streboj, la urbo ricevis oficialan kromnomon: la Esperanto-urbo***, kiu iĝis kleriga kaj kultura centro je dispono de la esperantistaro. Jen imitinda ekzemplo konkretiganta ĉiajn revojn de nia samideanaro! E.D.

* Se oni interesiĝas pri pliaj detaloj, vizitendas la ttt-ejo: https://eo.wikisource.org/wiki/Propaganda_piedvojaĝo


** Por ekscii pli, serĉu ĉe http://www.esperanto-muenchen.de/Klub/Geschichte/unua_jarcento.html

*** Ĉiaj ajn informoj pri la Esperanto-Urbo troveblas rete.

Fontoj: EdE; Litova Stelo; Vikipedio; Viena Muzeo

Nekrologo

Bedaŭrinde nia kara TEA-anino, Ingrid FRIIS SIGNORE, ne plu estas inter ni. Ŝi forpasis ĉ. je la 6^a de marto ĉi-jara en rehabilita fako, post braka rompiĝo. Ŝia ĝentileco, ŝia simpatio, ŝia bonkoreco neniam estos forgesita de ĉiuj kiuj konatiĝis kun ŝi. Ŝi naskiĝis en Aarhus, Danio, en 1932. Jam en 1940 ŝi eklernis Esperanton, ĉar ŝia patro estis fervora esperantisto: propagandisto, instruisto, verkinto de lernolibroj kaj eĉ organizanto de tuteŭropaj vojaĝoj. Sekve de turismado en Romo, Ingrid konatiĝis kun la venecia esperantisto Enzo Signore, tiuperiode laboranta, kiel bankisto, en la itala ĉefurbo. Post kelkaj jaroj ili geedziĝis kaj translokiĝis, laborkaŭze, al Triesto. En 1957 ambaŭ fariĝis membroj de Triesta Esperanto-Asocio, de kiu Ingrid restis anino ĝis sia morto. Ili aktivadis en la Esperanto-movado, loka kaj regiona, suprenante sur sin diversajn taskojn. Enzo Signore estis entuziasma instruisto, dum Ingrid okupiĝis pri la asocia biblioteko. Post la morto de la edzo (1981), ŝi ne tiom aktivadis por Esperanto, sed ekokupiĝis pri hundoj kaj katoj ĉe ASTAD, triesta besto-rifuĝejo. Kiam ajn ni renkontiĝis aŭ ŝi vizitis la asocion, ni ĉiam interparoladis internacilingve. Lastfoje mi vidis ŝin persone dum la 85^a Itala Kongreso de Esperanto, okazinta la lastan semajnon de aŭgusto 2019, en Triesto. Dolĉe ridetema, ŝi feliĉis esti kun ni kaj ĝui la sukceson de la kongreso: fine elkore ŝi gratulis nin pro la bona organizado. Tiel ĉi mi ŝatas ŝin rememori: en mia orelo ankorau sonas ŝia mallaŭta voĉo havanta tiun ĉarman akĉenton de ŝia denaska lingvo. E.D.



La radia voĉo dum kronvirotempo

Alirprogramoj ĉe RAI UNO



Vendredo 17 julio
h. 14.50-15.00


La internacia lingvo Esperanto dum la kronvirotempo periodo

Vendredo 7 aŭg.
h. 14.50-15.00

9 minutoj kun Hector Holder

Lundo 7 septembro
h. 14.50-15.00

Estontaj planoj



TRADICIA SOMERA FESTO ĈE ANITA

sabaton la 25^{an} de julio,
ekde la 16^a horo! Ni gaje kunfestadu!
Ĉiuj estas varme invititaj!

Fermo de la asocia sidejo: julie kaj aŭguste!

Aktiveco en TEA-sidejo ree komenciĝos **vendredon la 4^{an} de septembro je la 19^a horo!**

Ni atendas vin multnombraj, pretaj ekagadi por la prospero de nia TEA.



Bonan someran tempon kaj ĝis septembro!

Dimanĉon la 13^{an} de septembro 2020 Festo de Amikeco sur Monto Forno



Sur la Trilanda Pinto, *Dreiländereck*, renkontiĝos laŭtradicie la esperantistoj de Aŭstrio, Slovenio kaj Italio. Triestanoj kaj italoj, ne maltrafu ĉi okazon pasigi gajan dimanĉon en esperantista kaj internacia etoso.

Rendevuo ĉe la surpinta simbolo ekde la 12^a horo, kie bonvenigos nin ĉiujn Martin Stuppniĝ!

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO

Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com

Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste

Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21

Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936

Banka konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439

Reto: esperantotrieste@gmail.com; nored@tiscali.it

Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org; www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org